# EKO 2025

**Universitataj pensoj**

EKO 2025-38, Septembro 28  Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Alkroĉaĵo Akademio. Sume ? KB

## La 63-a Universitata kunpensado

Zohre Ramezani, profesorino de la persaj lingvo kaj literaturo, prezentis detalajn lumbildojn pri la historio de la instruado de Esperanto en iranaj universitatoj. Ŝi respondis al la priaj demandoj de la publiko, kune kun Ahmad Mamduhi, kiu klarigis kiel li sukcesis kapti la intereson de pluraj universitatoj pri Eo-kursoj.

Fransoazo Noireau parolis pri sia grandega plur jara laboro pri la organizado de Esperanto-kursoj pere de *WhatsApp* por universitato Espoir de Kongo.

Philippe Planchon komencis varbi studentojn por la venontjara Erasmus-semajno pri Esperanto ĉe la Universitato de Tours en Francio.

La venontan monaton Ahmad Mamduhi prelegos pri sia instruado de Interlingvistiko por la Universitato Espoir de Kongo kaj Bernhard Tuider de la Aŭstria Nacia Biblioteko parolos pri sia instruado de Esperanto ĉe la Universitato de Innsbruck.

Jen la registraĵo de la 63-a Kunpens(ig)ado pri Esperanto en universitatoj: https://www.youtube.com/watch?v=sF6PypA4oRM

Ahmad Mamduhi

## Matematikaj malsolveblaĵoj

Ĉu vi sciis, ke tri famaj matematikaj problemoj el la antikva Helena restas nesolveblaj eĉ post pli ol du mil jaroj? Nova artikolo en la retejo <uea.facila> rakontas pri la kvadratigo de cirklo, la duobligo de la kubo kaj la trionigo de angulo — kaj pri la juna geniulo Évariste Galois, kiu pruvis ilian nesolveblecon.

Aŭskultu la artikolon de **Mauri Cunha do Nascimento** kaj **Angela Faria** voĉlegitan de **Simone Schumacher** aŭ legu ĝin facile kaj klare ĉe **<uea.facila>,** kiun prizorgas **Anna Löwenstein** kun siaj kunlaborantoj https://uea.facila.org/kunlaborantoj/):

**Tri nesolveblaj problemoj**

Tiu rakonto montras la mirindan vojaĝon de matematiko kaj homa scio tra la jarcentoj.

## Frua printempo inter la sud-francaj mimozoj

La **Mediteranea Esperanto-Semajno 2026** okazos **de la 14-a ĝis la 21-a de marto 2026**, same kiel lastajn jarojn en la hotelo Miléade en **Les Issambres**, apud la Mediteranea marbordo en Suda Francio. La aranĝo inkluzivos **Esperantajn kursojn** por tri grupoj kaj kompletan distran programon, kaj

ekskurson por profiti la belan veteron de la Lazura Marbordo komence de la printempo.
**Kursoj estos gvidataj de elstaraj instruistoj:**

- kurso 1 (komencparolantoj): Katalin KOVATS (Nederlando - Hungario)
- kurso 2 (paroliga-kleriga kurso pri Esperanto-literaturo): Pawel FISCHER-KOTOWSKI (Nederlando - Pollando)
- kurso 3 (paroliga- kurso pri mikronoveloj): Maurizio GIACOMETTO (Britio - Italio)

Pli da detaloj aperas sur la retejo de Esperanto-Provence aŭ vi povas sendi al ni retmesaĝajn demandojn.

***SMG*** varme rekomendas la aranĝon. Li gvidis kursojn tie kelkfoje en la naŭdekaj jaroj. Li memoras sidi terase sub la akaciaj arboj kun glaso de la franca ekvivalento de la itala *grappa*. Krome, bonegaj francaj manĝoj. Kaj bonkvalitaj kursoj.

## La greziljona aŭtuno

La franca Esperanto-kastelo Greziljono en FR-49150 Baugé-en-Anjou invitas al siaj sekvaj Eo-eventoj en oktobro kaj aprilo 2026

- 2025-okt-24/nov-02 14a AŬTUNAS, la Esperanto-ferioj, kursoj kaj la franca FEI-ekzameno kun *Renée Triolle C1-C2, Dalia Pileckiene B1-B2, Alain Delmotte A1-A2*
- 2025-okt-21/28 Ĥora (korusa) renkonto kun *Bernard Bigonnet*
- 2025-okt-21/nov-06 Volontula komuna laboro, precipe ekstere en la parko kun *Isabelle Nicolas*
- 2026-apr-17/27. La 14-a PRINTEMPAS, intensaj kursoj kaj KER-ekzamenoj kun *Zsðfia Kðrðdy, Birke Dockhorn, Marion Quenut, Paweł Fischer-Kotowski*

Aliĝu tuj! Klaku ĉi tien.

Espéranto-Kulturdomo, kastelo Grésillon, FR-49150 Baugé en Anjou – France
Telefono: +33-2 41 89 10 34 (respondilo)
Retadreso: kastelo@gresillon.org; Retejo: gresillon.org

## Lingvo kaj Potenco: Politika Scienco en Lingvoplanado

La redakta teamo de la revuo *Language Problems & Language Planning* invitas vin al la tria retseminario en sia serio pri lingvopolitiko kaj planado. La temo estas "Lingvo kaj potenco: politika scienca perspektivo". Jen la prelegontoj:

- **Prof. Linda Cardinal** (Universitato de Otavo / Université de l'Ontario français, Kanado)
- **Prof. Peter A. Kraus** (Universitato de Augsburg, Germanio)

**Diskutgvidanto:** D-ro Michele Gazzola (Universitato Ulster, Britio)
**Dato:** Ĵaŭdo, la 30-a de oktobro 2025, **Tempo:** 15:30–17:00 GMT
**Platformo:** Zoom (https://unige.zoom.us/j/61017678609) – sen bezono de antaŭa aliĝo

La serio celas stimuli esploradon kaj diskutadon pri lingvopolitikaj demandoj el diversaj vidpunktoj. La sesio daŭros 90 minutojn, inkluzive de diskuto kun la publiko.

## La temo estas ‘temi’

Kirilo Brosch (Cyril Robert Brosch), direktoro de la Lingva Konsultejo de la Akademio de Esperanto, respondis al la demando pri la signifo de la vorto “temi”. Legu lian respondon ĉe https://sezonoj.ru/2025/09/akademio-30/

## Italaj belartaj premioj

La 24-an de aŭgusto 2025, fine de la inaŭgura ceremonio de la 91-a Itala Kongreso de Esperanto en Salsomaggiore Terme, okazis la premia ceremonio por la tri konkursoj de Itala Esperanto-Federacio:

***Literatura tradukkonkurso - branĉo poezio:***
1a premio: Claudia Maggi; 2a premio: Roberto Pigro; 3a premio: Erika Godó.

***Literatura tradukkonkurso - branĉo prozo:***
1a premio: Alessio Giordano; 2a premio: Manuela Ronco; 3a premio: Luca Coslovich.

***Konkurso Ĝanfranko pri kanzonoj originale verkitaj en Esperanto:***
"Sul insulo", kanzono de Marcelo Redoulez kaj Nanne Kalma.

Oni povas vidi la premian ceremonion ĉe tiu interreta Youtube-adreso:
https://www.youtube.com/watch?v=f5Xh1hGypq0

La sekretario de la konkurso, Valerio Dalla

## Mamduhi pri Renato

Jen artikolo, kiun mi verkis memore al kara prof. Renato Corsetti en la persa, kaj tiu hodiaŭ aperis en irana sendependa matena ĵurnalo "Ŝarg" (Oriento).

La artikolo memorigas nin pri la bedaŭriga forpaso de nia estimata Renato, sed samtempe antaŭenigas lian vizion pri deangligo - liberigado de nacioj de la anglalingva hegemonio per uzo de Esperanto.

La ĉefaj punktoj:

Same kiel dedolarigo liberigas landojn ekonomie, deangligo ebligas kulturan sendependecon

Esperanto ofertas neŭtralan solvon por internacia komunikado

Speciala signifo por landoj kiel Irano kaj BRICS-membroj

La artikolo montras, ke niaj idealoj pri lingva justeco kaj egala komunikado inter nacioj restas tre aktualaj en la hodiaŭa geopolitika kunteksto.

## Progreso en la belga arĥivejo

La arkivejo en Diest, aĉetita en 2024, nun plene funkcias. La arkivaĵoj ĉiuj estas surlokaj, orde aranĝitaj kaj sekuraj kontraŭ polvo, humido kaj temperaturvariado. La volontuloj havas ekipitajn laborlokojn kaj aldone funkcias prelegejo kaj kunvenejo: https://iespa.eu/index.php?ln=eo&pg=ejo

Ni instalis ne nur la ejon mem, ankaŭ la arkivo evoluas. Pluraj personaj kaj asociaj arkivoj alvenis kaj la katalogoj kreskas. Tiel ni enkatalogigis la deksesmilan libron, la

milan revutitolon (kun dek trimil revujaroj) kaj la unuajn sep mil dokumentojn kaj du mil objektojn. Neeviteble alvenas duoblaĵoj. Tiujn ni proponas malmultekoste por vendo. Elektu ankaŭ vi el nia 275-paĝa listo de libroj kaj binditaj revukolektoj:
https://iespa.eu/docs/IEspA-brokante.pdf
Vian elekton vi sendu al info@iespa.eu

IEspA aperigis Esperanton eĉ dufoje en la retejo pri nemateria heredaĵo:
https://immaterieelerfgoed.be/nl/erfgoederen/esperanto-in-vlaanderen-en-de-internationale-congressen kaj
https://immaterieelerfgoed.be/nl/erfgoederen/esperanto-spreken
Tio estas la unua paŝo al akceptado de Esperanto kiel nemateria heredaĵo en Flandrio, mem paŝo al UNESKO-rekono.

## Israela Virtuala Eo-Kunveno

Tion spektu per https://huji.zoom.us/j/7508982919 .

Amri kaj amikoj rakontis pri la Universala Kongreso en Ĉeĥio kaj pri posta ekskurso tra la plej belaj urboj kaj naturo de Ĉeĥio.

Amri Wandel

## Ekvinokso je sept 23

Pasis jam la tago, kiam la taglongoj estas en ekvilibro, tage kaj nokte – ambaŭ po dek du horoj. Miaj antipodaj gefratoj spertos la identan taglongon kiel mi. Nur – por li estas la ekvinoksa tagmezo, por mi temos pri noktomezo komence de la mirinda tago.

## Akademia ĝisdatigo

En pli frua kommuniko ni prezentis informon pri la akademiaj elektoj., kies fonto estis la estimida nederlanda revo Fenikso. Tamen, ni ambaŭ eraris per la prezento de inform0oj en 2022. Ekektoj okazis denove en 2025. Ni alkroĉas informojn en PDF-formato.

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Tridek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi 1ur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.